

Luise Hensel,  
Nachtgebet

Müde bin ich, geh zur Ruh',  
schließe beide Äuglein zu;  
Vater, laß die Augen dein  
Über meinem Bette sein!

Hab ich Unrecht heut' getan,  
Sieh' es, lieber Gott, nicht an!  
Deine Gnad' und Jesu Blut  
macht ja allen Schaden gut.

Alle, die mir sind verwandt,  
Gott, laß ruhn in Deiner Hand!  
Alle Menschen, groß und klein,  
Sollen Dir befohlen sein.

Kranken Herzen sende Ruh',  
Nasse Augen schließe zu;  
Laß den Mond am Himmel stehn  
Und die stille Welt besehn!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUISE HENSEL (\*30.03.1798 – †18.12.1876), publikigita 1816.*

*Arg-427-840 (2014-11-01 20:36:52)*

*Pri la poetino vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Luise\\_Hensel](http://de.wikipedia.org/wiki/Luise_Hensel). La teksto de la kanto troviĝas interalie en <http://www.volksliederarchiv.de/text1370.html> kaj en <http://www.christliche-gedichte.de/?pg=6201>. La muziknotoj troveblas en [http://www.lieder-archiv.de/muede\\_bn\\_ich\\_geh\\_zur\\_ruh-notenblatt\\_100168.html](http://www.lieder-archiv.de/muede_bn_ich_geh_zur_ruh-notenblatt_100168.html).*

Luise Hensel,  
Noktopreĝo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Lacas mi je l' tagofin'  
Kaj mi ripozigas min.  
Fermas la okulojn mi,  
Gardu min, ho kara Di'!

Se maljuston faris mi,  
Patro, ĝin indulgu Vi!  
Via graco tiom da  
Pekoj rebonigas ja.

Ĉiujn, kiujn konas mi,  
Lasu nun ripozi, Di',  
Ĉiujn homojn sur la Ter'  
Nokte gardu de danĝer'!

Faru, ke malsana kor'  
Resaniĝu, ho Sinjor',  
Kaj ke de l' ĉiel' la lun'  
Vidu sur la mondon nun!

*Traduko de la Germana poemo "Nachtgebet" de LUISE HENSEL (\*30.03.1798 – †18.12.1876) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-04.*

*MR-075-4 / Arg-427-841 (2014-11-01 20:29:11)*